

Ni akceptas membriĝojn kaj abonojn por 2012 laŭ la nunaj tarifoj ĝis la 31-a de decembro, 2011.

Mi pagas la sumon de \_\_\_\_\_ al:

- la konto **ilek-a** ĉe UEA (membriĝoj kaj donacoj)
- la konto **juna-I** ĉe UEA (abonoj al *Juna amiko*)
- la bankokonto de ILEI \* kun klarigo al la kasisto Julija Batrakova ĉe <persiko@mail.ru>.
- la sekciestro de ILEI en \_\_\_\_\_.
- la peranto de *Juna amiko* en \_\_\_\_\_.

Subskribo \_\_\_\_\_

Dato \_\_\_\_\_

\* Nederlanda bankokonto de ILEI: ING Bank N.V., kontonumero: 4676855; BIC: INGBNL2A; IBAN: NL55INGB0004676855. Por pagoj el ekster la Eŭropa Ekonomia Areo bonvolu aldoni €5.

## ILEI – la profilo

- **Ligo, kiu en 2010 organizis aŭ subtenis tri edukajn eventojn en tri kontinentoj ene de tri semajnoj.**
- **Ligo kiu eksplode kreskigis la nombron de siaj partneroj – kaj enmovadaj kaj eksteraj:**  
UEA, TEJO, UAM, ICH, AIS, ISAE, LIBE, Kastelo Grésillon, <edukado.net>, <lernu.net>, E@I, CED, ALIE, FILPV, ALTE.
- **Ligo kies membraro kreskis je 10% en 2010.**
- **Ligo kiu dediĉas eksterordinare altan proporcion de siaj modestaj rimedoj al plenumo de sia celaro kaj malmulton al interna administrado.**

## ILEI – la faktoj

- **ILEI eldonas por siaj membroj kvalitan revuon *Internacia Pedagogia Revuo (IPR)* kvarfoje jare, laŭ fizika kaj reta livero.**
- **La supera organo de ILEI estas ĝia komitato, kies membroj estas nomumitaj de la landaj sekcioj, da kiuj momente ekzistas trideko.**
- **La realiga teamo nomiĝas estraro, kutime sep-persona, kiu agas kune kun komisionoj, komisiitoj kaj laborgrupoj.**
- **ILEI, fondita en 1949, estas oficiale registrita en Nederlando, kun membroj en ĉ. 55 landoj.**

**Mi ĵus fondis Esperanto-kurson. Kiel mi ligu miajn studentojn al la mondo?**

**La respondo de ILEI estas la sekva:**

# Juna amiko

Jen alloga altnivela internacia revuo por lernantoj kaj komencantoj de ĉiuj aĝoj. Mallongaj, facile legeblaj artikoloj, en nekomplica Esperanto, kun konebla vort-trezoro (1500 radikoj) kaj rigora akademiana kontrolo. Trifoje jare, ĉiufoje sur 52 paĝoj, kun plenkoloraj kovriloj. Raportoj pri interkulturaj renkontiĝoj, rakontoj, fabeloj, poemoj, kantoj kaj multo pli. Kontribuantoj en dudeko da landoj, legantoj en kvardeko.



Vidu specimenajn paĝojn ĉe la retejo de ILEI, aŭ ĉe la biblioteko de <lernu.net>. listo de perantoj, la vortlisto kaj lastaj informoj troviĝas ĉe <www.junaamiko.inf.hu>

**Abonu tuj por 2011 kaj 2012!**

## Kelkaj Kasoj de ILEI

### Koleghelpa Kaso:

Membrigi instruistojn en landoj de limigita pagipovo, tiel permesantaj al iliaj sekcioj pluvivi kaj agadi.

### Kaso Dazzini:

Permesi al tiaj kolegoj partopreni en niaj konferencoj.

### Kaso Szerdahelyi:

Subteni la instruistan trejnadon kaj la kreskadon de transnaciaj lernejoj kontaktoj kaj projektoj.

**En unu eta prospekto, ne eblas mencii ĉiun agadon de la ligo; bonvolu viziti ĝian regule ĝisdatigatan retejon ĉe <www.ilei.info>.**

**"Kio okazus se morgaŭ iu lando decidus enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn? De kie venus la trejnitaj instruistoj?"**

**"Homoj nuntempe kaptas ideojn, okupas sin kaj lernas lingvojn en fundamente aliaj manieroj ol antaŭe. Ni adaptu nin al tio!"**

**"Edukado estas unu el la tri esencaj pilieroj de nia celaro" ... "Necesas profesiigi nian laboron." – El la ĝusnuna Strategia Plano de UEA.**



Kursanoj en Poznan

**Jen la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Jen organizo, kiu frontas la realecon kaj defion de tiuj diroj:**



**Pretiganta nin por pli hela estonto**